# LA SKOLTA MONDO

OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTISTA LIGO



**Trimonata revuo**

Volumo 4 Kvara jarkvarono
N-ro 28 Okt - Des 1975

**S ☆ E ☆ L**

Fondinto: "Avoto".
Kunfondinto: J.W. Leslie.

Honoraj Prezidantoj:
Avoto, Norman Booth, D. H. Davis, L.J. VanGulck.

Prezidanto: John Berggreen, Brattvollveien 23c, Oslo 11, Norvegujo. Telefono 02-283035.

Sekretario: J. K. Hammer. Taxusstraat 7, Zaandam-1400, Nederlando. Poŝtkonto 632246. Telefono 075-166931.

Kasisto kaj Administranto de "La Skolta Mondo": David H. Withey, 21. Brookfield Avenue, Waterloo, Liverpool L 22 3ye, Britujo. Telefono 051-928-2936

Redaktoro: Hans Amund Rosbach, Nergata 37c, N-6500 Kristiansund N, Norvegujo. Poŝtkonto 8030413. Telefono 073-77620.

Membroj de Centra Komitato
Allan Fineberg, 76 Seventeenth Av, Paterson, NJ 07531, Usono.

⋮ ⋮ ⋮

Ŝindo -Seitaro, Nisimikuni 1-tyôme 200, Higasi-yodogawa - ku, Osaka-si, Japanujo.

La Skolta Mondo aperas kvarfoje en la jaro.

Okaze de nericevo, bonvolu informi la Nacian Reprezentanton aŭ la Administranton.

Karaj amikoj!

Per tiuj ĉi linioj mi volas deziri al vi feliĉan Kristnaskon.

Feliĉa — tio ne signifas unuarange monon, havaĵojn aŭ gloro aŭ pozicio. Ne, pli gravas la ĝojo kaj la bonstato de la animo pro bona konscienco.

Kaj tial tiu vorto tre bone harmonias kun „Kristnasko", kio signifas, ke naskiĝis al mi Savanto, helpanto al kiu mi povas min turni pri kio ajn ek de manko de vino — aŭ io ajn alio — al la plej peza mizero de mia animo. „Kiu venos al mi, mi ne forpelos" li mem diris!

Feliĉan Kristnaskon!

Hans Amund.

# Pensoj pri

## *de la prezidanto*

Mi montras al la oficiala raporto (kiun mi ankoraŭ ne legis, skribante ĉi tion) skribita de nia ĝen. sekr. Hammer.

Mi ŝatas aldoni miajn proprajn impresojn, kaj substreki kelkajn punktojn pri la spertoj tie akiritaj por ke ni eluzu tiujn spertojn en estontaj tendaroj.

Nia unua grava sperto sendube estis ke estas tre malfacile voki la atenton de la granda amaso de la partoprenantoj en tia grandega tendaro, simple pro la grandeco de la tereno. En Nordjamb ni fakte bezonis pli ol 1 plena horo por rapide promeni tra la 10 subtendaroj sen viziti unu el ili. Por resti kaj paroli kun la unuopaj grupoj oni devus havi multege da tempo - kaj esti centoj da SELanoj. Ni estis tro malmultaj, kaj devis koncentriĝi je la plej gravaj punktoj de nia plano por informado pri Esperanto por skoltoj.

Sed laŭ la cirkonstancoj ni fakte atingis niajn celojn tie, ĉar ni altiris la atenton al nia laboro de multaj flankoj - unuopaj skoltoj, skoltestroj, stabanoj, ĵurnalistoj.

Mi volas substreki la signifon de nia ekspozicio, la disdonadon de miloj da faldfolioj en diversaj lingvoj, vendadon de lernolibroj, la artikolon pri E. en la tendargazeto, kaj la personan kontakton kun unuopaj skoltoj kaj gvidantoj.

La lasta verŝajne kondukos al novaj Naciaj Reprezentantoj en 6-7 landoj kie ni ne havas tiajn. Ni povas nepre konstati, ke multaj skoltoj nun por la unua fojo aŭdis pri E. kaj spertis ĝian praktikan valoron vidante kiel facile la ĉeestantaj skolt-esperantistoj povis interkompreniĝi sen lingvaj baroj.

Ke la bezono de E. estis grandega ni povis konstati el diversaj okazoj. Ekzemple dum la granda "hejko" (ekskurso 24-hora) kun 8 knaboj el 8 diversaj nacioj montriĝis laŭ raportoj en la tendargazeto, ke en kelkaj patroloj neniu komprenis la anglan aŭ la francan, la solaj oficialaj lingvoj de la skolta movado.

Alia ekzemplo: Dum la Gilwell-renkontiĝo la kunvenprezidanto (norvega skoltestro kiun mi bone konas) parolis nur en la angla, kaj tuj venis protestoj flanke de la francaj skoltestroj. Fine oni devis alvoki interpretiston, al kiu la francoj demonstrative manklakis. Poste la kunvenprezidanto iris al mi kaj diris: "John, jen ni estus havinta Esperanton!"

Alia epizodo memorinda: Dum la unutaga vizito de Paul Ronald - la kanada NR - li kaj mi transdonis saluton de la SEL-kunveno dum la UK en Kopenhago al Odd Hopp, la ĝen.sekr. de la Tendara Komitato kaj fakte la ĉiutaga gvidanto de la tuta Nordjamb. Li ne ĉeestis sian oficejon kiam ni alvenis, sed la postan tagon mi hazarde renkontis lin. Li dankis pro la salutletero kaj diris: "Mi komprenis la tutan enhavon de la letero laŭ la Esperanto-teksto sen rigardi la anglan tradukon." - Cetere ankaŭ la prezidanto de UEA Tonkin sendis dankleteron al Odd Hopp pro lia helpo al SEL (laŭ mia peto.)

Kajjen aliaj pruvoj pri la kreskanta prestiĝo kiun akiris SEL inter la oficialaj organoj de Norvega Skoltknaba Asocio: Kiel vi scias, mi persone estis invitita aliĝi al la stabo de Nordjamb (kvankam mi ne plu estas aktiva skoltestro!) kaj loĝi en "National Hedquarters" kune kun skoltgvidantoj de la diversaj naciaj grupoj krom kelkaj fakuloj. Kiam mi alvenis 3 tagojn antaŭ la malfermo, estis kun mi ĝen.sekr. Hammer kaj la usona NR Fineberg, kiujn mi prezentis korekte kiel miajn stabanojn kaj petis pri rajto, ke ankaŭ ili loĝu tie. La tendarestro unue malkonsentis ĉar neniu kiu ne estas aprobita

antaŭe rajtis loĝi tie, kaj li devis resendi al siaj hejmlandoj (Usono kaj Sud-Afriko) 2 skoltestrojn, kiuj ne estis aliĝintaj sufiĉe frue. Nu, post kelkhora "premo" kaj kun helpo de la estro por tiu fakgrupo, al kiu mi apartenis ("diversaj programeroj") ni fine sukcesis kiel ekskluziva rajto por SEL.

Unu tagon vizitis nian ekspozicion ĵurnalisto kaj fotografisto de la oficiala tendargazeto kaj faris intervjuon. Tiu artikolo estis donita al la multaj eksterlandaj ĵurnalistoj. La tendargazeto ankaŭ presis artikolon en Esperanto, kiu do estis la sola lingvo krom la angla kaj la franca (eĉ ne la norvegan). Ni memoru ke oni uzis verŝajne proks. 50 diferencaj lingvoj inter la 17.297 partoprenantoj el 91 landoj.

Alia grava evento estis la filmado pri nia ekspozicio, kiun faris la filmgrupo de la ĉefskolto el Kolombio. Li fariĝis tiel entuziasma aŭdante pri la celoj de SEL ke li restis inter ni dum tuta horo kaj promesis ke tiu filmo kaj pri grupo de skoltfratoj el diversaj landoj demandante pri E, estu nepre parto en la filmo, kiun li poste sendos al multaj landoj. Li ankaŭ asertis ke li volas sendi leteron al SMO en Ĝenevo, petante ke E. estu la tria oficiala lingvo por la skoltoj! Kaj li promesis prezenti la temon en la skoltestra konferenco en Kopenhago. Fine li invitis nin 3 membroj de CK esti liaj gastoj dum la vespero, - kun komuna kanto en Esperanto, kaj interparoladoj kun Allan Fineberg kiel tradukisto en la hispanan - je nia surprizo!

Rilate al la Junulara Forumo ni kontaktis 2 reprezentantojn ( el Norvegujo kaj Kolombio) por ke ili tie prezentu la lingvajn problemojn por skoltoj.

Bona signo estis ankaŭ la afabla akcepto ĉe la subtendarestroj kiam mi petis la rajton starigi nian ekspozicion en iliaj tendaroj. Ili ĉiuj tuj jesis!

Dum niaj ĉiutagaj interparoloj ni 3 membroj de CK kaj la 3 NR nature diskutis ne nur la labortaskojn dum Nordjamb, sed niajn estontajn taskojn ĝis la ĵamboreo en 1979.



Nia ĝenerala sekretario estis komisiita ellabori planon por tiu kampanjo surbaze de niaj diskutoj.

Je mia forvojaĝo mi verkis raporton pri nia laboro en la ĵamboreo laŭ peto de la gvidanto por la programaro, kaj tiu raporto aperos en la oficiala raporto pri Nordjamb.

Estas kompreneble malfacile prijuĝi la efikon de nia laboro kaj la valoron por SEL. La rezultoj aŭ la rikolto ja kutime venos iom da tempo post la semado, sed mi opinias, ke multaj signoj aludas al novaj venkoj por SEL en la proksima estonteco.

Tio tamen dependas de 2 gravaj kondiĉoj: Unue ke ni ĉiuj daŭre kaj persiste donos nian plej eblan forton al informado pri niaj celoj, kaj due ke ni povos konvinkigi la skoltgvidantojn pri la bezono kaj utilo de E precipe por la geknaboj skoltaj La lasta tasko estas tre grava kiam ni pripensas la venontan mondĵamboreon en Irano 1979 kie ni tute ne havas - almenaŭ ne nun - tiajn valorajn kontaktojn kiajn ni havis ĉifoje inter la gvidantaro de la skoltasocio en la gastiganta lando

Tial estas tre valora la granda mondonaco kiun SEL ĉisomere ricevis (kan.dol.2200.-) pri kiu ni raportas aliloke en tiu-ĉi numero, ĵuste kun la celo plibonigi la kontakton al SMO en Ĝenevo kaj la ĝeneralan informadon pri E inter skoltoj.

Fine mi volas esprimi mian sinceran dankon al miaj ĉefkunhelpantoj - unuavice la oferema helpon de J. K. Hammer kaj Allan Fineberg, kaj la Naciajn Reprezentantojn Dennis Pease (Nov-Zelando), Franz Schwärzler (Aŭstrujo) kaj Patrick Deveughele (Francujo). Ni ankaŭ tre ŝatis la mallongajn vizitojn de la

NR por Kanado U.P.Ronald kaj por Norvegujo H.A.Rosbach, krom la nova ina NR por Aŭstrujo Eva-Marie Frauenhofer.

-------------

Mi devis forlasi Nordjamb 2 tagojn antaŭ la fermo por veturi al Kopenhago por starigi novan ekspozicion pri E por skoltoj.
Tio okazis en propra stando por SEL en kadro de la oficiala ekspozicio SKOLTAJ AKTIVECOJ dum la 25-a Tutmonda Skoltestra Konferenco 8.-15.a de aŭgusto.
Tie partoprenis proks. 600 skoltgvidantoj el 107 landoj! kaj ili ĉiuj verŝajne ekvidis nian ekspozicion preterpasante la lokon ĉiutage dumvoje al apuda konferenca ĉambrego. Nia stando feliĉe ricevis tre konvenan lokon tuj post la enirejo al la ekspozicia halo.
La valoron por ni mi ne kapablas taksi, sed almenaŭ mi aŭdis laŭdvortojn kiel "bela kaj tre interesa ekspozicio" de vizitanto tuj post la muntado. Hejmenveninte norvega skoltestro raportis al mi ke ĉiutage vizitis nian standon multaj personoj. Do mi supozas ke ĝi donis komprenon por la celoj de SEL kaj eble efikis diskuton pri la temo Esperanto por la skoltoj.

Oslo, 28. aŭg.1975

John Berggreen

# Granda mondonaco

Kun granda plezuro ni povas raporti pri donaco de 2200 kanadaj dolaroj (egale al ned gld 5100.) al SEL de amikino de la skolta movado loĝanta en Kanado.

La celo de la donaco estas - laŭ letero de la prezidanto Tonkin al nia prezidanto Berggreen - helpi en la enkondukado de Esperanto en la oficialaj medioj de la skolta movado kaj subteni kampanjon por oficialigi Esperanton, ekzemple en Skolta Monda Oficejo kaj en la konferencoj kaj ĵamboreoj de la skoltoj.

La donaco venis tra UEA, kiu oferis sian helpon pri la utiligo de la mono en la plej efika maniero, kaj CK de SEL dankeme konsentis pri tio.
Dum Nordjamb la ĉeestantaj CK-membroj kaj NR'oj tie ellaboris planon por utiligo de la donaco, kiun ni diskutos kun UEA dum la aŭtuno.

JB.

# KVANKAM



ni supre raportis pri granda mondonaco al SEL, neniu devas pensi: Jen SEL estas riĉa! Ni ĉiam bezonas la aktivan subtenon de niaj membroj - kaj ni bezonas la membrojn!

Tial: Ne forgesu, ke ni nun transiros al la jaro 1976, kaj ke vi pro tio pagu kotizon. Se vi povas pagi pli ol la minimuma kotizo tio estas tre bonvena, se vi povas membrigi aliajn geskoltojn, tio estas eĉ pli kara! Ĉar la fundamento de SEL estas la membroj.

Post enpago de kotizo vi rajtas ricevi la gazeton, kaj vi ricevu membromarkon por la membrokarto. Se vi ne ricevas - atentigu la Nacian Reprezentanton aŭ la Generalan Sekretarion.

# NUR AERO ?

Oni iam parolis pri ĝentileco. Ho, diris unu, estas nur aero? Nu, ja, respondis la alia - sed ĉu vi iam provis bicikli sen havi aeron en la tuboj?

Ne nur tiurilate ni homoj dependas de la aero - aŭ de la atmosfero. Ni ne povas spiri sen ĝi, tion ni scias. Kaj la aero ĉe la terglobo enhavas sufiĉe da oksigeno por vivteni nin.


Unu "guto" de aero enhavas 78% nitrogenon, 21% oksigenon, 0,9 % de la gaso argono, krome vaporon en tre variaj kvantoj, 0,03% karbodioksidon kaj malgrandajn kvantojn de aliaj gasoj.

Kaj ni - homoj, bestoj kaj plantoj - tute dependas ne nur de la 21 % oksigeno, sed ankaŭ de la 0,03% karbodioksido, ĉar el tiu ĉi nevidebla gaso (kaj el akvo) la verdaj plantoj surteraj kaj enmaraj produktadas la diversajn sukerspecojn. Kaj se tiu ŝajne neatentinda enhavo de la karbodioksido forestus, la fotosintezo ne povus okazi, kaj ni ne plu povus vivi sur la tero.

La atmosfero ankaŭ enhavas vaporon. Tion vi povas vidi per la roso sur la herbo kaj kampoj en fruaj matenoj. Io el la vaporo densiĝas en la aero kaj estas videbla kiel nuboj. Kaj el ĝi falas la vivdona pluvo. Pensu pri tio, se vi plendas pro "malbona vetero", kaj pripensu ankaŭ la katastrofon en la tielnomitaj Sahel-landoj en Afriko.

Kion vi eble ne pripensas, ni volas mencii. La atmosfero estas por ni ŝildo kontraŭ la ĉiama pafado el la granda "spaco". El ĝi faladas pli -malpli grandaj meteorŝtonoj. Vi povas vidi kelkajn en la vesperoj - eble ankaŭ vi nomas ilin "stelopafoj". Kiam tiuj ŝtonoj venas en nian atmosferon ili havas grandegan rapidecon, kiu kreskas pro la altira forto de la tero, sed la atmosfero bremsas tiel forte, ke ili varmiĝas ĝis ruĝa gluo. Jen vi povas vidi ilin! Kaj post sekundoj ili forbrulas kaj vaporiĝas. Tiel nia atmosfero en ĉiu tagnokto ricevas aldonon de ĉirkaŭ unu tunon de polvo kaj gasoj.

Pensu mem pri la bombardado sur la teron se ni ne havus tiun ŝildon!



Ankaŭ en alia maniero la atmosfero servas kiel ŝildo por ni.

El la "spaco" venas multspecaj radioj.

La atmosfero tralasas lumradiojn kaj eĉ disigas ilin, tiel ke ankaŭ lokoj al kiuj la sunradioj ne rekte atingas, ĝuas la lumon.

Kaj la atmosfero tralasas varmoradiojn de la suno. Sed la pli subaj partoj de nia atmosfero servas kiel iu lana kovrilo kaj ne permesas al la varmo senpere trapasi. Sen tio la tagoj fariĝus neelteneble varmaj, kaj la noktoj tiel malvarmaj, ke ĉio vivo frostmortus

Sed kelkaj radioj ne povas trapasi la atmosferon.



Ĉe la supro de la malsupra tavolo de la atmosfero, estas tavolo de osono Se tiu ŝildo malaperus (ekzemple pro nia nesaĝa uzo de aerosolujoj) la tre danĝeraj radioj senpere atingus nin. Sciencistoj nun opinias, ke redukto de la osontavolo de nur 5% kaŭzus grandegan kreskon de haŭtaj kanceroj!

En la jonosfero, kiu komencas ĉ 80 km super ni, estas aliaj tavoloj - ekz. de elektrifizita (jon-ita) aero. Unu el tiuj tavoloj ekestis pro la x-radioj kiuj venas de la suno. Kaj tiel tiuj mortigaj radioj estas haltitaj. Alian tavolon kreis i.a. al tre ultravioletaj radioj, kiuj do ankaŭ ne atingas al ni.

Pripensu tion ĉi venontfoje, kiam vi en la libera aero plenigas viajn pulmojn per la freŝa aero - kiu donas al vi vivon. Aŭ kiam vi vidas la fabriktubojn elverŝi malpuraĵojn. Pripensu la balancon de la atmosfero kaj la utilon de tiu balanco. Pripensu la belecon de birdoj kaj nuboj, kaj sciu, ke sen la atmosfero vi neniam vidus helbluan ĉielon, griẑajn aŭ blankajn nubojn aŭ multkoloran ĉielarkon.

# Skoltismo dise en la Mondo




Scouting 'round the world. 130 paĝoj, 21x30 cm Prezo: 12 svisaj frankoj (USS 5) antaŭpage, mendebla ĉe Supply Service, World Scout Bureau, C P 78, CH - 1211 Geneva 4.

Scouting around the World estas bela libro, plena je informoj pri ĉiuj skolt-asocioj en la mondo. La libro klarigas la diferencojn inter la diversaj asocioj, priskribas iliajn specialajn interesojn kaj aktivaĵojn, kaj donas informojn pri la nombro kaj aĝo de la membraro.
Krome ĝi donas la tekston de la skoltaj promeso kaj leĝaro de la koncerna lando. Multaj bildoj, ĉefe la diversaj skoltaj insignoj kaj desegnoj de Baden Powell ornamas la libron.
Enkonduka parto klarigas la laboron de la Centraj organizaĵoj de la Skolta Movado, kiel la Konferenco kaj la Monda kaj Regiona Oficejoj. Vere tre valora libro por tiuj, kiuj interesiĝas pri internacia frateco kaj kunlaboro. La libro povas multe kontribui al pli bona interkompreno.

Tamen bedaŭrinde ankaŭ kritiko necesas. La enkonduka parto estas dulingva: franca kaj angla, do jam nelegebla por multaj skoltoj, kiuj parolas unu el la pli ol 40 aliaj lingvoj en la Skolta Movado.
Inter ili estas ne nur granda parto de Sud-Eŭropo, Afriko kaj Azio, sed preskaŭ la tuta skoltaro en Suda Ameriko!
La situacio en la parto pri la naciaj skolt-asocioj estas eĉ pli ĝena, ĉar por plene kompreni tion, oni devas regi ambaŭ lingvojn, kaj la anglan kaj la francan. La informoj estas plene en la angla lingvo, sed la teksto de la promeso kaj leĝaro ofte estas en la franca lingvo.

La libro do denove estas demonstracio, ke, sen Esperanto, la Skolta Movado nur malbone povas funkcii.
Estas mirige, ke grandaj grupoj de skoltoj, ekzemple tiuj kiuj parolas la hispanan, germanan aŭ araban, daŭre kontentas esti duagradaj skoltoj.

En la teksto mi trovis kelkajn neĝustaĵojn, kiuj tamen en la tuto ne tro gravas.

Ko.



## ĴAMBOREO:

La policestro de Lillehammer, la urbo apud kiu la ĵamboreo estis, diris:
Estas rimarkinde, ke post aranĝo kun pli ol 17 000 partoprenantoj ne estas eĉ unu sinturno plenda al la polico.

Kaj la direktoro de Maihaugen, la liberaera muzeo, diras, ke la 17 mil skoltoj kreis malpli da problemoj ol kreas unu lerneja klaso per sia vizito.

Sed la norvega "Lederen", gazeto por skoltestroj, ankaŭ notas iujn malbonajn flankojn:
La troa interŝanĝado de insignoj ktp, kaj ĉasado de suveniroj.
Ekzemple iu skolto estis surprezata dum li provis forpreni unu ruĝan leterkeston, kiu apartenas al la norvega poŝto!

Populara programero - kaj tute nova por ĵamboreoj - estis i.a. "North Trail", dum kiu la skoltoj povis provi siajn sciojn pri la ordinaraj skoltaj lertecoj de la nordaj landoj. Ankaŭ la hajkotra neloĝataj regionoj kaj sen teĥnikaj helpiloj estis nova programero.

La redaktoro de LSM **povas noti** malgrandan rezulton de la ĵamboreo ĉar sin anoncis 13 skoltoj - aŭ pli precize 12 skoltoj kaj 1 ino - al esperantokurso. Ili ĵus eklaboris, uzante nian "Ĵamborea Lingvo", sed certe esperas post kelka tempo trovi leteramikojn inter la legantoj de LSM.

Kaj ni samtempe notas:

20-jara skolto Antonio Carrascasa, Andalucia 22, ARANJUEZ (Madrid) petes korespondon.




## NOTOJ

Skoltaj libroj nun estas haveblaj ĉe la libroservo de la franca Esp.-asocio en Parizo. Tion prizorgis nia NR P.Deveughele.
Adreso: UFE, Rue de la Cerisaie, F- 75005 Paris.

Longan distancon vojaĝis nia NR en Aŭstralio por viziti lokan esperanto-grupon kaj la skoltan klubon: preskaŭ 650 kilometrojn! Kvar novaj membroj aliĝis.

Tre aktivis Belgujo: artikolo en "Esperanto en Marche" venigis al ni plurajn mendojn. Aŭtuna skolta kunveno en Leuven havis ekspozicion pri Esperanto.

Eddy Frederickx bedaŭrinde eksiĝis kiel NR sed ne forlasis nin. Nova NR estas Gert van Damme, Marie Jose laan 31, B- 2600 BERCHEM. Ni kore bonvenigas lin en nian rondon.

La Asocio de la Tamaj Skoltoj en sia Konferenco akceptis kiel oficialaj lingvoj la francan kaj la anglan. Ni avertis ilin antaŭe! Jam baldaŭ ili renkontos la samajn malfacilaĵojn, kiujn havas la Skolta Monda Oficejo.

George Winkler en Germanujo tre aktivas. Jam li ĝojigis nin per nove presitaj fakturoj kaj leterpapero, kaj baldaŭ aperos novaj faldfolioj en diversaj lingvoj.

Internacia Tendaro okazos en la somero de 1977 en Bregenz, Aŭstrujo. La programo enhavos: naĝado velŝipado kaj instruo pri tio, ekskursoj tra la montaro, kaj aliaj aktivaĵoj.
Kredeble pluraj membroj de SEL tie kunvenos, ĉar kunlaboranto estas nia NR Franz Schwärzler.
Petu informojn, esperantlingve, ĉe:
Peter Pröll,
Gabler strasse 3,
A 6900, BREGENZ.

# Alispeca Kristfesto



En la pasinta numero de La Skolta Mondo mi anoncis i.a. pri studvojaĝo al Anglujo. Tio estis miaj planoj, sed Dio volis ion alian!
Miaj vojaĝplanoj montriĝis neeblaj, kaj en granda urĝo mi devis fari novajn kaj kontaktiĝi kun amikoj en Germanujo kaj Svedujo.
Mi povus raporti multon - sed al skoltoj la pli granda parto verŝajne estas ne seninteresa, sed tamen sen speciala intereso.
Sed mi kredas, ke al skoltoj, kiuj havas la devizon "Ĉiam preta", la renkontiĝo kun "Nova Komuneco" en Stockholmo devas interesi - kaj ĉefe en kombino kun Kristnasko.
La tuto komenciĝis Kristnaske kiam grupo da kristanoj pripensis la evangelion: Mi havas ĝojon, kiun ĉiuj homoj devas sperti! Kaj jen inter ni estas homoj, kiuj ne spertas iun ajn ĝojon pro la kristnasko - nur la plifortigitan senton, substrekitan de la gajaj hejmoj - ke ilin ĉiuj forgesis.
Temas pri senhejmuloj, pri la alkoholistoj kaj narkotikuloj kaj aliaj mizeruloj, el kiuj abundas en grandurboj.
Kaj la pripenso kondukis al la vortoj de Jesuo: Vi devas doni al ili la "panon", t.e. kion ili bezonas.
Jen ili do ekagis. Ili kunvenis, kaj post preĝo faris kafon kiun ili kunprenis elirante en la grandurbon por trafi la mizerulojn kaj regali ilin per la varma trinkaĵo kaj inviti ilin al kristfesto en granda salono.
Kaj jen, en tiu salono kunvenis la senhejmuloj por kristfesto ek de la kristvespero al la 13.a "tago" de kristnasko.

Sed Kristo ankaŭ diris:
La povruloj ĉiam estas inter vi!
Kaj ankaŭ tiu vorto estas voko al la fidantoj.
Kaj ekkreskis la Nova Komuneco, en kiu partoprenas kristanoj el ĉiuj konfesioj kaj homoj el ĉiuj klasoj, tiel ke la limoj inter la homoj ne plu devas disigi: ĉi tie ne estas judo aŭ greko, viro aŭ virino, riĉulo aŭ malriĉulo, abstinenculo aŭ alkoholisto, katoliko aŭ lutherano aŭ pentekostano aŭ..., sed ĉiuj estas unu en Kristo! Tiel la membroj de tiu Nova Komuneco povas renkontiĝi surstrate (sen honti pro tio) kaj en eklezaj salonoj, - kaj ili kuraĝas montri signojn pri ilia amo!

La skolta devizo estas: "Ĉiam preta!"
Ĉu ni estas?
Ankaŭ al tiu "devo al Dio kaj la proksimulo"?

La vortoj de la anĝelo estis:

Mi proklamas al vi grandan ĝojon, kiu estas al la tuta popolo: Savinto naskiĝis!



Hans Amund Rosbach.

NACIAJ REPREZENTANTOJ:

Aŭstralio: H.J.C.Brendel, 3/119 Kadumba Str.,Yeronga -QLD 4104.

Aŭstrio: f-ino Eva-Marie Fraunhofer, Badenerstr 7, A-2512 Tribuswinkel/ Baden pr. Vieno
s-ro Franz Schwärzler, Rathausstrasse 2, A-6900 Bregenz.

Belgujo: s-ro Gert van Damme, Marie Jose-laan 31, B 2600 Berchem.
s-ro L.J.VanGulck, Lt.Lippenslaan 33 bus 11, B-2200 Borgerhout
Poŝtk.to Belga Skolta Esp.-Sekretario 000-0327460-85.
Tel (031)3688.08.

Brazilio: s-ro Euclides C Soares, Av. Almirante Tamarande 979, Belem, Para

Britujo: s-ro C.Bardsley, 42 Westbourne Str., OL9 6AR Oldham, Lancs.

Danlando: s-ro Bjarke Nielsen, Erdalsvej 30, DK-2600 Glostrup.

Finnlando: s-ino Irja Klemola, Nunna, SF-20660 Littoinen

Francujo: s-ro Petrick Deveughele, 53 Av.de Rigny, Appt 64, F-94360 Bry sur Marne.

Germanujo: s-ro Georg D. Winkler, Haroldstrasse 47, D-41 Duisburg 1.

Hispanujo: s-ro Pedro Marqueta, F el Catolico 32, 5°izqda, Zaragoza. Tel 252044.

Irlando: s-ro Frank Dobbs, 8 Ailesbury Grove, Dublin 4.

Italujo: s-ro prof. F Tulone, Via Frangipene 8, I-92019 Sciacca, Agrigento. Tel 21.198.

Japanujo: s-ro Sinzo Sumiya, Daido Kagaku Sooti K.K. 16, Suekirotyo Kitatu, Osaka.

Kanado: s-ro John H.F. Hoyle, Box 421, Forest Ont.
Helpa NR: S-ro Paul Ronald, 45, 10th Ave., Roxboro, Queb.

Nederlando: s-ro B.J.Wijmer, Vreebos 41, Zoetermeer/2280. Tel 079-215868

Norvegujo: s-ro H.A.Rosbach. Vidu paĝon 2 sub "redaktoro".

Novzelando s-ro D.B. Pease, 6a Bay Road St Heliers, Auckland 5

Portugalujo s-ro J.de Matos Correia, Rua Cidade da Horta, Lote Q-5-3°, Pontinha, Lisboa 4.

Svedujo: Peranto: s-ro Ragnar Hjorth, Kronobergsgt 25, S-11233 Stockholm.

Usono: s-ro : Allan Fineberg, 76 Seventeenth Ave, Paterson N.J. 07513.

Informoj pri membreco:
En landoj kun Nacia Sekcio: Informiĝu ĉe NR kaj pagu al li la kotizon.

Individuaj membroj (Nur en landoj sen N.R.!) Kotizo inkl. abono:
Junuloj ĝis 18 jaraj: Ned.gld. 3.30 aŭ egalvaloro.
Pliaĝuloj: Ned. gld. 5.00 aŭ egalvaloro.
Subtenantoj: Minimume Ned. gld. 5.00 aŭ egalvaloro.

Adresoj de la Centra Komitato: Vidu la duan paĝon.

Konstanta adreso de S.E.L.: Postbus 433, Zaandam, Nederlando.






# LA SKOLTA MONDO

OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTO LIGO

Limtempo por manuskriptoj kaj anoncoj: 1.a de Februaro, Majo, Aŭgusto kaj de Novembro.



---

REDAKCIO: N-6500 KRISTIANSUND
NE ISSN 0037-6558